# *Naciaj observantoj aprobitaj por elektoj en venezuela ?tato*

Image not found or type unknown

.

Karakaso, dec 23 (RHK) La Nacia Elekta Konsilantaro  aprobis ses civilajn organiza?ojn kiel naciajn observantojn por la elektoj de la 9-a de januaro en la venezuela ?tato Barinas.

Tania D'Amelio, rektoro de la vo?dona organo, klarigis en sia Tviter-konto, ke ili havos la taskon atesti la travideblecon de la procezo en senpartia, respondeca kaj sendependa maniero.

?i tiuj organizoj estas: Socia Projekto, Balota Observa Reto de la Civila Asocio Asembleo de Edukado, Venezuela Asocio de Juristoj, Venezuela Balota Observatorio, Fonda?o por Digna Popolo, Internacia Centro por Superaj Studoj.

La elektoj por la guberniestro de Barinas okazos en januaro post kiam la Supera Kortumo de Justico malkvalifikis por la ofico, la  opozician kandidaton Fredy Superlano.

Sep kandidatoj estas prezentitaj al la novaj elektoj, inter ili la eksministro pri eksteraj aferoj Jorge Arreaza, por la koalicio de la Granda Patriota Poluso, kiu komencis sian kampanjon merkrede.

Fonto: Prensa Latina

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/280727-naciaj-observantoj-aprobitaj-por-elektoj-en-venezuela-stato

**Radio Habana Cuba**